

Johann Wolfgang von Goethe, Same	Johann Wolfgang von Goethe, Super montoj regas kviet'	Johann Wolfgang von Goethe, Same tiel
-------------------------------------	--	--

tradukita de Pejno Simono

tradukita de Poul Thorsen

tradukita de Richard Schulz

Super montopintoj —
silent',
tra pinoplingvoj
la senvent'
spiras sen fort';
arbare la birdoj ekmutas.
Pretu, aludas
silento pri mort'.

Super montoj
regas kviet',
tra l' foliaro
nur ventet'
spiras kun trem'.
Birdoj arbare silentas,
se vi atendas,
pacas vi mem.

Super ĉiuj montoj
Trankvil',
Kaj ĉiuj fontoj
Sen babil';
Aŭdas vi ne
Birdetan ĉirpon arbare.
Pensu prepare
Pri la pere'!

*Traduko de la Germana poemo "Ein Gleiches (Wanderers Nachtlid)" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de PEJNO SIMONO (Simon Edward Adrian Payne, *1941-12-23).*

*Traduko de la Germana poemo "Ein Gleiches (Wanderers Nachtlid)" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de POUL THORSEN (*1915-01-07 – †2006-01-30).*

*Traduko de la Germana poemo "Ein Gleiches (Wanderers Nachtlid)" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Richard Ŝulco, *1906-07-12 – †1997-09-26).*

Arg-356-1974 (2014-03-14
14:12:56)

Arg-356-708 (2010-05-28
21:34:24)

Arg-356-706 (2013-02-26
15:16:30)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://eo.wikipedia.org/wiki/Goethe>.

Poul Thorsen estis dana Esperantista poeto, kiu verkis multajn originalajn kaj tradukitajn poeziaĵojn en la Internacia Lingvo. Vidu ankaŭ: <http://www.poulthorsen.dk/> kaj <http://www.liberafolio.org/2006/forpasis-poul-thorsen/view>.

Tiu Esperantigo aperis komence de la okdekaj jaroj de la 20a jarcento en la "Vestfaliaj Flugfolioj", kiujn eldonis Richardo Ŝulco (Richard Schulz), honora membro de Germana Esperanto-Asocio. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz.